



La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio
Fondita en Julio 1920.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O., Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por 12 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj. Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: Reginald Banham, F.B.E.A.

Specimena numero—unu respondkuponon aŭ 30 c. U.E.A. kuponon.

Unu numero: 4 pencoj.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 129 (Tenth Year) Melburno (Melbourne), Aŭstralio. Mario, 1931

N.Z.E.A. SECTION. 5th Official Bulletin.

Notwithstanding the inroad made by the festive season into the quarter concluded since the publication of the **4th Official Bulletin**, the New Zealand Esperanto Association has accomplished much useful, though perhaps unspectacular work during the period. In addition to the usual enquiries from N.Z.E.A. members and other Esperantists regarding common questions relating to the language and the movement, requests for information concerning Esperanto, textbooks, and tuition have been received from several of the general public. These requests have been satisfied, and the N.Z.E.A. has been given further opportunities to show forth its usefulness and to fulfil the aims of those Dominion enthusiasts who, in January, 1929, stressed the necessity for and established the national organisation.

Propaganda Work Continues.

The N.Z.E.A. has pursued its propaganda policy wherever possible; and succeeded in arranging with the editor of "**The School Committee Journal**," published at Auckland, for a re-print in full of the N.Z.E.A. specially compiled propaganda leaflet issued last year. By this means much convincing data were again placed before the educational authorities. Translations relating to the various postal administrations were also prepared and forwarded to the editor of "**The Katipo**," who readily gave them prominence in his journal—the official organ of over 7000 New Zealand post and telegraph officers. **Por Esperanto per Esperanto.**

Pan-Pacific Conference.

Preliminary steps have been taken by the N.Z.E.A. in an effort to arrange for either an official representative or a discussion on the subject of Esper-

anto at the next Pan-Pacific Conference.

Membership, etc.

Although the financial year of the N.Z.E.A. ends on the 31st March, four additional members have come forward. On the other hand, three members, Mrs. McGuigan and two sons, have departed overseas, thus increasing the number of N.Z.E.A. members abroad to eleven and relatively decreasing the number at home. Two other members renewed for the new year, thereby doing their share towards encouraging the office-bearers in their work. In view of the General Election this year—at time when much can be achieved for the language—it is hoped all who have Esperanto at heart will accord the N.Z.E.A. full support. To assist is a simple matter: renew subscription (2/6), which fall due on **1st April**, early, and introduce as many additional members—active or associate—as possible. (Hon. Sec's address: Mr. W. H. King, 10 Queen Street, Wellington.)

Since the 1st November, the N.Z.E.A. funds have benefited by two further donations — one of 5/- from Mr. D. Tilly, Whangarei, and another of 5/2 from Mr. G. Woodhill, Half-way Bush, Dunedin. Increased income from this source will hasten the issuance of a book of N.Z.E.A. rules and of a List of Dominion Esperantists.

Second New Zealand Congress.

The second New Zealand Esperanto Congress is being arranged under the auspices of the N.Z.E.A. to take place at Auckland during Easter. A strong Local Congress Committee comprises Mr. C. J. Adcock (Chairman), Mrs. Watkin and Mr. Russell (of the N.Z.E.A. Executive), and Messrs. Marinovich, Robinson, and J. P. Lauder (Secretary), representing the Auckland



Club. All communications in connection with the congress should be forwarded to the L.C.C. secretary, care Mr. J. S. Russell, 2 Pukenui Rd., Epsom, Auckland. A programme is under consideration, and although details have not yet been completed, all who anticipate taking part can rest assured an enjoyable time awaits them in the Queen City of the Dominion. As in the case of the First Congress, the primary object of the Second is to propagate and to prove to the public that Esperanto is advancing in New Zealand, and at the same time to afford Dominion Esperantists opportunities of meeting each other and of using the international language — the link of nations. An invitation to the congress is being issued separately to all New Zealand samideanoj and sympathisers whose addresses are registered with the N.Z.E.A.; and, needless to state, any Australian friends who may visit Auckland during the congress will be very cordially welcomed.

(W.H.K.)

NEKROLOGO.

Forpasis ĉe Masterton, Nov-Zelando, je la 23a de Januaro pasinta, post longa malsano, s-ino L. Payne. 62-jaraĝa, kunfondintino de la nuna grupo de Masterton. Por ĉiam sur la paĝoj de la Historio de Esp-o en Nov-Zelando estos skribita ŝia altestimata nomo. Ĉar estante anino de la N.Z.E.A. kaj U.E.A., arde laborinta pioniro de Esp-o en la Donjino, kaj fervora, vera amikino de la movado ĝenerale, s-ino Payne multe klopodis por la lingvo, aŭ instrue aŭ propagande aŭ sekrete riine. Al la edzo respektplenajn kondolencojn.

KRONIKO.

Masterton, N.Z.—Dum Februaro du gravajn kunvenojn okazigis nia grupo—la ĉiujara je la 3a, kaj la 6a fest-vespero ĉiujara je la 10a. Ambaŭ altiris grandan ĉeestantaron.

Ĉe la antaŭa s-ro B. Johns kapable prezidis. Pro alta respekto al la memoro de nia mortinta eks-sekretariino, s-ino L. Payne, la ĉeestantaro staris mallonge en silento.

La grupoficistoj estis re-elektitaj por la nova jaro, sed s-ro H. Franks (38 Warksop Rd.) estas la nova sekretario kaj grupdelegito al N.Z.E.A. Estis decidite, ke la ĝenerala komitato konsistu el ĉiuj grupoj; ke s-ro H. Franks kaj s-ro A. M. Dewar estu la fest-afera

komitato; kaj ke la kotizo estu po 5ŝ. ĉiujare.

La festa vespero estis sukcesego pleje pro la energio kaj entrepreno de la nove enoficigita sekretario, s-ro Franks. Parlamentano s-ro G. R. Sykes prezidis, kaj post la kantado de la nacia himno, li priparolis Esperanton kaj la internacilingvamovadon. Multaj bonegaj programoj estis provizitaj de ne malpli ol deko da ĝeroluloj, ĉiu el kiuj ricevis (kaj meritis) aplaŭdon. Specialmenciinda estis la kantado de "La Espero" de s-ino Fieldhouse, kiu, prononcante perfekte la Esperanto-vokalojn, donis al la kantado ĉiom da riĉtono, kiom havas la itala lingvo.

Farante proponon de danko al la lokaj redaktoroj, s-ro E. J. Coleman donis meritan tributon al tiuj, pro iliaj afableco kaj komplezo etenditaj al la ĉi-tiea grupo dum longa tempo.

KURSO PER TRADUKADO

(kondukata de George Gordon, F.B.E.A.; sek-iino Miss B. Blyth, Victoria-av., Surrey Hills, Melb., E.10.)

—oOo—

TRADUKO 16

KAPTADO DE SOVAĜAJ HUNDOJ EN AŬSTRALIO

(el "The Sun News Pictorial" de la 7a de Junio, 1930.)

—oOo—

La kaptado de sovaĝaj hundoj (dingoj) estas profita entrepreno, almenaŭ en Okcidenta Aŭstralio, kie en senvoja regiono mi akompanis spertegan kaptiston. Li diris, ke en unu sezono, antaŭ ol komencis konkurado en lia elektita parto de la vasta ebena, li ensppezadis po (1) ĝis okdek funtoj sterlingaj en ĉiu semajno.

Canis dingo, la stranga hundo, da kies rasanoj oni kaptis aŭ venenis multajn milojn en lastatempaj jaroj, tamen troviĝas en aliaj partoj de Aŭstralio krom (2) en la neplene esplorita centra regiono.

En partoj de Viktorio dingoj estas tre tro multaj. La estraro de ĉiu "shire" (A), en kiu dingoj estas multenombraj, pagas rekompencan por mortigo de tiuj bestoj. La sumo ne estas sama ĉie, sed en iuj "shires" ĝi estas po (1) kvin ŝilingoj por ĉiu prezentata skalpo. En Okcidenta Aŭstralio la rekompenco estas po (1) du funtoj (3), kiujn pagas la registaro kaj iu brutedukistara kaso, ĉiu duonon de tiu

sumo, tial ĉiu libera dingo reprezentas eblan grandprofiton. La kaptadon praktikas ne nur profesiuloj, sed kiel kromlaboron ankaŭ aliaj homoj, kiuj semajnfine per ĝi profite sin amuzas.

Metodoj de kaptado estas diversaj, sed tiu de sperta kaptisto estas tia, kia certigas sukceson, kie senzorge metita kaptilo malsukcesus.

Mi observis la metodon de homo, kies ĉiusemaja enspezo, je kaptado estas dek du funtoj pli ol la rilataj elspezoj. Li portis pezajn, ledajn gantegojn kaj per la nudaj manoj tuŝis nek kaptilon, nek logaĵon, nek la grundon ĉirkaŭ la arbusto, kaŝanta (5) ilin (3), ĉar la dingo estas akreflari kaj suspektemaj.

Estas arto en la metado de kaptiloj, kiel en ĉiu alia grava afero, kaj oni ĝin akiras el la lernolibro de la sovaĝejoj. Logaĵo konsistas el kuniklo, bova osto kun karno sur ĝi aŭ el peco da ŝafo, metita (5) malantaŭ la kaŝita kaptilo, sur kiun devas paŝi dingo logata al mortiga manĝo.

Kvankam dingo estas malkuraĝa en libereco, kaj oni malfacile proksimiĝas al ĝi, tamen dingo en kaptilo vidigas mirindajn kuraĝon kaj eltenon ĉe sufero. Ofte okazas, ke mizera viktimo formaĉas piedon kaj tiel sin forsavas, kripliginta (6) por ĉiam.

Kvankam la plenaĝaj dingo estas singardemaj, la dingidoj, ĉarmaj kreitaĵoj laŭ eksteraĵo, estas tiel scivolemaj, ke ili sentime aliras altrudulon. Unu fojon unu venis preskaŭ ĝis aŭtomobilo kaj rigardis la kaptiston en la vizaĝon.

La dingo neniel deziras, ke oni eks-ternu la kuniklojn en Aŭstralio. Tra vastaj areoj de la internlando la dingo sekvas la kuniklon, kiu sekvas la manĝeblaĵon, irante de partoj dezertiĝintaj (5) pro senpluveco al tie, kie la vegetaĵo estas verda aŭ kie estas vivrimedoj por kunikloj.

Komprenoble estas, ke la dingo ja meritas sian malbonan reputacion inter brutpaŝtistoj (4) kaj terkulturistoj. Ĝi estas ŝafmortigulo kaj ofte mortigas nur por la plezuro de mortigado. Tamen la natura nutro de la dingo konsistas el marsupialoj, tiaj, kiaj valabioj (B) kaj bandikutoj (C). Miksrasuloj devenintaj de pariĝo de dingo kun domhundo estas la pli ruzaj. (daŭrigota)

A. "shire" (pron. ŝajr). Nomo de unu el la dividoj de la ŝtato por administrado.

B. "valabio." Transliteraĵo de Aŭstralia nomo (wallaby) por la pli mal-

grandaj specoj de kangaru'similaj bestoj de la genro makropo.

C. Transliteraĵo de la Aŭstralia nomo (bandicoot) por la insektmangaj marsupialaj bestoj de la genroj **pareceles**, **paragale** kaj **choeropus**.

NOTARO 16.

1. "po" ne signifas la Anglan "c" sed "at the rate of." Notaro 6/6.—2. "krom." L. R. pĝ 70.—3. Kiam Angla frazo estas dusenca aŭ dubesenca, oni tradukante devus kiel eble konstrui por klarigi la signifon.—4. Oni edukas (brings up, rears, raises) infanojn, ĉevalojn, ŝafojn, bovojn, porkojn, kokinojn k.t.p. "Brutedukisto," raiser of live stock (Gen. xlvii, 32). "ŝafedukisto" aŭ "ŝafpaŝtisto," sheep farmer, pastoralist (Gen. iv, 2). "Bredi" (vorto ankoraŭ ne oficialigita) ne estas samsignifa kiel "eduki" sed signifas "to breed as a business or hobby pure-blooded animals."—5. Adjektiva participo.—6. Oni subkomprenas "estante" antaŭ "kripliginta."

Preseraroj en Tradukota Peĉo 17. En L2 forstreku "and" antaŭ "dog," la punktokomon post "wild." En L4 post "killer" anstataŭigu la punkton per komo.

—ESPERANTO— UNIQUE CONGRESS LANGUAGE

The true ground on which to test the fitness of English for the role of secondary world tongue is not a German hotel or a French ticket office but the assembly hall of an international congress. Here the discourse is not confined to the exchange of simple question-and-answer heard many times a day, but assumes a character that may take the loftiest flights of imagination, or follow the subtlest labyrinths of reasoning.

English is taught more or less widely in all European states, and in some ranks only second in importance to the language of the country concerned, but in spite of this advantage, never, in any country, has there been held a truly international congress in which only English was used. This is significant.

Opponents of Esperanto in English-speaking lands would seem to lack a healthy confidence in the future of English as a world secondary tongue, for they are ever stressing what they term the imperative need for the study of foreign languages in order to furnish effective equipment to those engaged in the struggle for new trade markets.

In the United States the teaching of modern languages is diligently fostered, but there are more pupils there learning French than German, Spanish, Italian and Latin put together. One would, however, wrongly infer from this that America deems the world to be moving towards acceptance of French as its auxiliary tongue!

On ground worth holding—the large-scale international congress—Esperanto has strikingly outpointed English, its great rival. 1931 should record ever more decisive and eloquent victories on this field.

INTERNATIONALITY OF STYLE

Prof. Cart said: "In Esperanto there is only one rule of style: to write as clearly as possible. That which is clear may be incorrect, but never bad Esperanto. There is only one prohibition: to write obscurely. That which is not clearly comprehensible may at times be correct, but never good Esperanto."

Prof. Cart said also that while logic helps to make a language easy, that is not absolutely true: logic must yield, if necessary, to certain idiomatic mannerisms common to European peoples, mannerisms that Esperanto does not aim to obliterate. But composition in Esperanto may be correct and comprehensible without revealing those characteristics that lift it up beside that of the best stylists.

There lacks in so much writing that crisp originality of expression, that light effortless construction born of the power to weave pleasing word-vesture, that proclaim the writer as one who has drunk deep at the wells dug by the masters.

This is well known; here are a few examples drawn from recognised stylists. It would be interesting, while reading them, to think of the phrases we would have used to translate the same thoughts, or to write the English expressions down and ask the best English-speaking Esperantist of your acquaintance to translate them. Would not the comparison throw light on this problem of internationality of style?

A costly piano immediately caught the eye (tuj falis en la okulojn multekosta fortepiano); The Frenchwoman, who sprawled in the armchair (la francino, kiu large etendite sidis en la brakseĝo); I would very much like to get a permanent position (mi tre dezirus ricevi firman oficon); Where do

you permanently reside? (Kie vi loĝas konstante?); The paleness of his face (la laca koloro de lia vizaĝo); But the illusions could not last long (sed la iluzioj ne povis teniĝi longe); Instead of making any reply, she bent down... (anstataŭ ĉia respondo, ŝi kliniĝis...); Supply and demand (proponado kaj postulado); But is philosophy everything? (sed ĉu nur pri filozofio estas la parolo?); It's a long time since you were with us (kiel longe jam vi ne estis ĉe ni); Train of thought (fadeno da pensoj); (E. was a "young lady," and I was a mere girl (E. estis fraŭlino kaj mi estis simpla knabino); She was endowed with a fair share of common-sense (ŝi posedis sufiĉan dozon da prudento); After a few moments (post kelka momento); In a jiffy (post mallonga momento); The big gate was opened full-wide (Oni malfermis en la plena larĝo la pordegon); Front windows looking on to a bustling street (frontaj fenestroj elirantaj sur multehoman straton); Well matched things (harmonie interkonformigitaj objektoj); Glowering, repressed anger (obtuza, retenata kolero); Well dressed (peneme vestita); What of it? (Kio do sekvas el tio?); How far is... (Kiom distancas...?); Put yourself in his place (Imagu do vin sur lia loko); How many of us are there? (Kiomope ni estas?); To keep his courage up (por teni al si varme la stomakon); How good you are to me! (Vi estas tro bona kontraŭ mi!); He had a man's suit made for her (li lasis fari al ŝi viran veston); indubitable and incontrovertible facts (sendubaj kaj nemalkonfeseblaj faktoj); what particular language fate has ordained.. (kia nome lingvo la sorto difinis..); positively absurd! (rekta absurdo!); go and fetch it! (Irprenu ĝin!); I touched a sore point (mi tuŝis ĝenan flankon); Now then, up you get! (Nu he! Surplanden!).

Notice in these examples the complete freedom from that "Englishy" taint that mars the work of far too many British Esperantists. Let us all learn by heart the following words of him who was acclaimed the greatest stylist after Zamenhof himself:

"Se efektive mi estas ne malbona Esperanta stilisto, mi havas nur unu meriton, ke mi atente legis kaj studis da verkojn de nia Majstro, inokulis al mi la mirindan simplecon kaj naturecon de lia stilo kaj penis ĉiam ĝin imiti. Se mi sukcesis, mi atingis la rezultaton nur

dank'al la elekto de bona modelo kaj al fidele imitado." (Kabe).

ROSEEROJ.

Tia estas la titolo de la dua libreto da poemetoj verkitaj pri simplaj temoj de holanda vojaĝema Esp-isto, s-ro Adalberto Smit. Rezulte el lia vizito al diversaj belvid-lokoj en Eŭropo, li lasis al si elverŝi kelkajn poezie esprim-tajn priskribojn, el kiuj eble la plej bona estas "Budapeŝta Belo." La ĉetero facile tuŝas sur la amsenton, kaj satiretas aŭ kondamnas malfortajn flankojn de la homa naturo.

Montriĝas, ke ĉi tiu poeto kapablas vortludi simile virtuoze al tiu de la franca versisto Schwarz. Bedaŭre ie kaj ie la pensoj ne kontentige pasas de lia koro en sian lingvaĵoveŝton. Mal-graŭ tio la verketo meritas simpatian trakton pro tio, ke ĝi enhavas plaĉe tintantajn versojn kiaj jene:

Dum la dormo la demono,

Kies nomo estas "Mono"

Ne plu persekutas nin.

Akvo gustas kiel vin'.

Tro pezanta, ora krono

Aluminiigas sin.

Smit enkondukas divers-iele kelkajn neologismojn, kaj provas du-tri novajn formojn. "Tipad" (?); parkeda (par-geta); resurekcio (releviĝo el la morto); konvoj' (?); kio signifas "plenpatosa" aplikata al "Zaragosa"? Dunkl-okula (G. dunkel; do "dark-eyed"). "Eho-ado." Meto de sufiĝo -ad post la substantiva finaĵo estas stranga. Prezo O.75 guldano pere de la BEA.

LA JUNULINO EL STORMYR.

Inter svedaj verkistoj staras Selma Lagerlof kiel ĉefa. Tujuste ŝi ricevis la Nobelpremion en 1908, kaj nun oni vidas verketon sian vestita per la bela lingvaĵo de l' interhoma paco, Esperanto. La recenzanto pensas supozebla, ke oni feliĉe elektis ĉi tiun romaneton, kiel respegulon de la genio Lagerlofa.

En juĝejo la perfidita Helga perforte tiras biblion el manoj de la kulpa fiĵur-onto, por ke li, laŭ ŝia simpla kredo, ne malferru por ŝi la pordon de l' infero. Per tio ŝi nescie admirigas sin antaŭ okuloj de Gudmund, jam fianĉo kun riĉa Hildur.

Post ebria konfuzvespero li pensas sin mortiginta kundrinkulon. Hildur, hontkolere, forrifuzas malfeliĉan Gudmund, sed Helga, sekrete tenanta pruvatestaĵon pri la senkulpeco de Gud-

mund, informas la ekŝianĉinon pri tio. Ĉi tiu, instigite de la amanta lin Helga, kiu antaŭ ĉio celas la edzan feliĉon de Gudmund, iras por ŝajnigi sin edziniĝ-vole pardonanta spite al lia krimo, sed senreteneble elverŝas antaŭ Gudmund la faktojn de la afero.

Konstante la okuloj sorbas la tekston ĝis la finlinioj, en kiuj la fidele sindona Helga laŭdestine gravitas al la koro de Gudmund, kiu ĝustatakse rezignas la riĉan Hildur-on favore al hardita amo.

Ĝi estas ĉarma novelo, kaj la traduko de s-ro O. Frode estas simplalingva kaj flulegebla, eĉ estus bonega se ne estus tiom multaj gramatikaj eraroj, precipe da misuzo de verbttempoj. Denova ekzemplo de la neŝago, ignori la konsilon, ke oni nepre submetu publikigitan verkon sub kontrolan manon de kompetentulo. Ne-ĝuste uzitaj; majstro', kontrol' (reg'); ofer' (prezent'); return' (reven'); multoblajn (multajn); realizebla (realigebla, plenumebila); surtabl(ig)is; sabl-(ostern)is; 67, spite (tion); kolerigita (kolera); 80/3 antaŭulo (?); pensema (pensdrona, enpensa), troa uzo de -em; "kiam" ne estas necesa post "dum"; grava stila eraro estas uzi ne la ordonan verbon post "por ke" (por ke... kuragus!); Ofte la tradukisto fuŝas la verbttempojn, kaj paraĝrafo unua sur p.26 postulas tro da komprenpeno. Prezo Kr.1.50 (1/6) per AEA.

(Robo)

KURACA HELPO SUR MARO.

Radio, kompatema ŝipestro, hirurgo de la ŝipo kaj vojaĝanta kuracisto, ĉiuj ĉi ludis sian rolon en rakonto pri homa helpo sur maro.

Pro agemeco de kelkaj bonkoruloj unu germanino nun kuŝas resaniĝanta en hospitalo en Kolombo, anstataŭ esti devinta travojaĝi suferi la Ruĝan Maron en malforta fizika stato.

Tiun marrakonton faris en Perth, okcidenta Aŭstralio, 6/1/31, s-ro J. H. Scullin, ĉefministro de la aŭstralia federacio, ĉe bonveniga tagmanĝeto honore lian revenon el Eŭropo. Li trafe ilustris la kredon, ke ne estas homa instinkto militi kaj mortigi, sed kontraŭe ŝavi vivon kaj nutri.

"Ni gaje daŭrigis vojaĝadon tra la Ruĝa Maro. Tiam venis S.O.S., ke unu germana virino sur holanda ŝipo estas en mortdangero, kaj ke mankas kuracisto tie. La holanda ŝipo forestis cent mejlojn de ni. Kion faris do la ŝipes-

tro nia? Li havis pli ol mil personojn kaj multegkoston ŝipon sub sia zorgo. Ĉiu horo da vojaĝo kostas kvindek ĝis cent sterlingoj, ĉiu horo da prokrasto maltrankviligas kaj ĝenus al la ŝipanoj kaj pasaĝeroj. Malgraŭ tio, li ne hezitis momenton, li ordonis ŝipon iri reterne por depreni la germaninon for de la holanda ŝipo, kaj metiŝin en zorgon de brita kuracisto.

Kvankam tio eble estis nur simpla okazaĵo, ĝi provizis al ni unu el tiuj "tuŝetoj de l' homa naturo, kiuj parenigas la tutan mondon."

Ĉiu pasaĝero ĝis malfrua nokto staris sur ferdeko, por rigardi la maristojn eliri kaj alporti la virinon sur sian ŝipon; matene ili zorgeme demandis, kiel ŝi sanstas post grava operacio.

Plezurege ili sciigis, kiam ni albor-diĝis ĉe Kolombo, ke ŝi bone progresas sur vojo de l' resaniĝo. Oni monkollektis sur la brita ŝipo por ebligi al la germanino reiri al sia familio.

Ĉar okazaĵoj, kia tiu ĉi, estas ne maloftaj en homaj vivoj, sed estas rimarkitaj ĉiutage, kiu do povas diri al ni, ke estas natura instinkto de l' popoloj militi unu kontraŭ la alian kaj unu la alian mortpafi?

Trad. el West Australian, 7/1/31.
A. Frakseno.

MIAJ IMPRESOJ PRI AŬSTRALIO (de Inocento Seriŝev, Sydney)

[La redakcio tute ne respondecas pri ia opiniaĵo de la supra sinjoro, kaj volonte presigus leterojn kritikajn de legantoj tuŝantajn sur la temo.]

Mi loĝas en Aŭstralio nur apud kvar jaroj kaj neniam iris for el Sidnejo; tial mia kono de Aŭstralio estas tre limigita. Tamen, ĉe loĝante en Sidnejo, mi ricevis certan opinion pri la lando. Estante 45-jaraĝa, vizitinta 15 landojn, amikiĝinta per Esp-lingva korespondo kun homoj de 80 nacioj, mi povas pretendi ian sperteton kaj observon pri la homa vivo.

Kiam mi vivis en Japanujo kaj presigis en japana Esp-lingva revuo miajn impresojn pri tiu lando, severe kritikante kelkajn negativajn flankojn de la

popola karaktero, mi ricevis dankojn pro mia sincereco, ĉar japanoj mem ne povas rimarki siajn negativajn trajtojn. Estu la samo ĉi tie.

POZITIVAJ FLANKOJ DE AŬSTRALIA VIVO.

(1) Demokratismo

estas la unua, kio frapas okulojn de fremdulo alveturinta Aŭstralion. Eble tiuj venintaj el Usono aŭ Nov-Zelando ne tiel miras, sed envojaĝintoj el aliaj landoj certe ricevas fortan impreson.

Rusoj, kiuj antaŭe vizitis ĉi-landon, nomis ĝin "lando de vera demokratio," "laborista paradizo." Kaj vere, komparante ĝin kun la aliaj landoj de demokratio, ni devas konfesi, ke N.Z. kaj Aŭstralio paŝas multe antaŭe. Precipe rusoj miras pri tio, veninte el lando de estinta carismo kaj nuna komunismo.

Ne nur nin agrable frapas la politika kaj socia leĝdonado por bono de gelaboristoj kaj gelaborantaj oficistoj, sed ankaŭ la demokrata, t.e., simpla arango de vivo, simpla moraro.

Ĉiuj homoj aspektas egale, kaj surstrate oni ne povas distingi ĉu iras en aŭto laboristo ĉu inteligentulo profesoro, advokato. Soldatajn kaj oficirajn uniformojn oni preskaŭ ne rehkonstas.

Laboristoj povas vivi samagrabile kiel burĝoj; ili ofte havas aŭtojn; ili havas du tagojn semajne por ripozi ĉe marbordo; ili povas loĝi eksterurbe.

Ilia salajro en multaj okazoj sufiĉas por garantii ŝparaĵojn. Ili ricevas helpon pro ĉiu infano; maljuniĝinte ili ricevas pension; malsaniĝinte ili ricevas ripozon, senpagan kuracon, senpagan naskon de infanoj. Senlaboruloj, se ne drinkuloj, ricevas senpage nutraĵon ĉe "labor exchange."

Irante sur la stratoj oni preskaŭ neniam renkontas speciale inteligentajn aŭ intelektajn vizaĝojn. Vere estas la regno de laborantoj.

Tiu demokratio, kvankam mokata kaj severe kritikata de multaj fremduloj, sukcesis krei la belan landon kaj starigi la bonegajn leĝojn, pro kio multaj ekster-aŭstraliaj landoj emas ĝin imiti.

HAROLD PUDNEY

Kial fuŝe skribaĉi per kripla fontanplumo? Vi povas denove senti tiun plezuron, kiun donas facile funkcia fontanplumo, se vi alportas ĝin al H. Pudney, multjara spertiĝinto, kiu lerte riparas ĝin je malalta kosto ĝis re-

Specialisto pri Fontanplumoj

noveco.

Ĉu nova fontanplumo kiel donaco, aŭ por vi mem? El ĉiu speco ili kuŝas ĉe li je facilaj prezoj. Aparta atento donata al poŝt-mendoj.

Notu adreson:—

Sufiĉo da eraro estas farata, nemal-multaj difektoj makulas en ĉi tiu sistemo administrada, tamen la plusoj estas pli grandaj ol la minusoj.

(2) Bonhumoreco de la popolo.

Generale ili estas simplaj en interrilatoj kaj bonhumoraj. Preskaŭ ĉiam ili ridetas kaj ofte estas sufiĉe ĝentilaj. Někutime estas al rusoj aŭdi, ke nekonatoj preterpasante ekparolas ĉu pri vetero ĉu simple salutis. Ili ofte ŝerĉas eĉ kun nekonato. Ili ŝatas babili ĉio ĉi montras ilian simplecon kaj bonhumoron.

(3) Ili ŝatas legi.

Ili amas legi ĉu gazetojn ĉu revuojn ĉu novelojn. Samon mi rimarkis en Japonujo; trame, vagone, ĉekase atendantaj sian vicon, surstrate, ĉie oni vidas ilin legantaj.

Certe estas ne malpli grava la problemo pri la kvalito de legataĵo ĉar sola kvanto ne sufiĉas por paroli pri edukiteco de popolo kaj ĝiaj emoj al altaj intereso. Tiurilate mi nesufiĉe konas.

La preskvantoj de taggazetoj (120-180.000 potage) estas eĉ kolosaj.

(4) Simpatio al animaloj.

Mi rimarkis simpatian de loĝantoj al animaloj. Mi ne renkontis krudajn scenojn de surstrata batado al ĉevaloj, infana turmento al katoj kaj hundoj, kiel ofte mi observis en mia patrujo. Eble ekzistas krueleco tia, sed ĝi ne evidentiĝas.

Ekzistas en Sidnejo La Reĝa Societo Kontraŭ Krueleco al Animaloj. Ĝi senpage akceptas katojn, hundojn por ilin sendolore eterndmigi. Ekzistas lernejoj societoj de birdprotektado. Bonkristane!

(5) Kontrolataj fremduloj.

Kompreneble ili estas sed tiel lerte kaj nerimarkeble, ke tio ne ilin ŝenas. Tute kontraŭe fariĝis en cetero kara al mi Japonujo, kie detektivoj en-trude, malsaĝe vin spionas. Estas agrable, ke tie ĉi oni ne postulas pas-por-tojn; plena malaĵo al libera komunisma Rusujo kaj imperialisma Japanujo, kie sen pasporto homo ne estas homo, kie homo konsistas el korpo, animo kaj pasporto.

(6) Civiliziloj.

Demokratismo estas tie ĉi ligita kun la plej modernaj civiliziloj. Gaso, elektro, telefono, radio, — ĉio tio regas vaste en privata vivo. Speciale min interesas la benzinumado de la vivo. En N.S. Kimrio ekzistas pli ol 205 000 aŭtoj pli ol 100.000 motorcikloj, pli ol 1.800 aŭtobusoj. La vivo estas mekani-kumata.

Bedaŭre mi ne povas ankoraŭ trovi pozitivajn flankojn, tial mi alvenu al negativaj, des pli, ke estas ĉiam pli facile vidi en la frata okulo malbonajn branĉojn, ol en la koro la dolĉajn; tio estas ja nur homa, kaj mi ne estas esceptulo.

NEGATIVAJ FLANKOJ DE AŬSTRALIA VIVO.

(1) Tro multe da drinkejoj.

Ĉu ne vere? Ĉiupaŝe oni vidas drinkejojn. Ĉiam enestas homoj, kaj kio estas plej abomena, virinoj. En neniu lando mi vidis sur strato ebriajn, kompatindajn idinojn de Eva, sed en Sidnejo ĉiam mi vidas tion.

Drinkemo estas la nacia malsano kaj malvirto. En stato de ebrio homoj evidentiĝas sian bestan naturo en plej naŭza formo.

Malŝatas ni rusoj la aŭstralian manieron drinki. Homoj ne sidas komforte en drinkejo, kiel en Eŭropo, sed staras ĉe longa tablego. La impresoj estas tre forpuŝa. Mi memoras, ke en mia lando, estante studento kaj drinkema, mi vizitis bierejojn; sidante kelkhorojn en apogseĝo mola, mi trinkis nur unu botelon, legis, konversaciis amike, skribis leterojn, revis. Tio ne estas drinkeco. Sed tie ĉi homoj staras, rapidas fordrinki kiom ili nur povas kaj forstumbas ebriaj. Malagrabla estas la arango de aparta ĉambro por virinoj; mi neniam vidis tian en Rusujo, kvankam tie la popolo tre ŝatas drinki. Nur prostituintinoj foje renkontiĝas ebriaj surstrate en Rusujo, sed tie ĉi grizharulinoj falpaŝas idiote sur strato kun blunigraj makuloj survizaĝe — honoraj signoj de batalado.

Stranga kaj nekomprenebla estas la leĝo frue malfermi drinkejojn. Kial? Por ke la laboristo povu antaŭlabore ebriiĝi? Same pri la frua malfermo; se homoj deziras ripozi ĉe tablo en drinkejo, li ne povas tion fari post laboro.

(2) Barbara boksado.

Frapas nin la reganta ĉie kutimo boksadi. Kio povas esti pli maldelike malgracia, estetike abomena? Mi vidis kelkfoje, kiel du malsaĝuloj demetas jakon kaj kiel du kokoj batalas sur stratmezo kun bona trafiko, policano staras flanke rigardante, homamaso kolektiĝas, aŭtoj ĉirkaŭveturas. Nenio simila estas ebla en vere kultura lando.

Li estas forta kaj bona boksanto, mi estas malforta sed prava. Li konkuras min, kaj en la okuloj de observantoj li estas prava kaj salutata, kaj mi estas malprava kaj mokata. Tia estas justo de popolo aŭstralia. Boksado estas an-

koraŭ tial abomenega. ke ĝi celas difekti vizaĝon, kiu estas "spegulo de homa animo." Rompi nazon, eligi okulon—fi, eĉ vomige estas paroli pri tio.

(3) Trouzo de sporto.

Ne neante la ĉiufankan utilon de sporto, mi tamen energie kondamnas la troan ardegon kaj kvazaŭ idolismon al ĝi. Laŭ 'merito oni povus nomi Aŭstralion "lando de drinkejoj" kaj "lando de sportoj."

Kian ajn gazeton aŭ revuon oni enmanigu al si, ĉiutage oni trovas kelkajn paĝojn pri sporto, ĉevalvetkuroj ktp. Eĉ en surstrataj grandliteraj gazet-anoncoj oni ĉefe legas—pri sporto. La ilustraĵoj estas duone prisportaj. Vi komprenu, ke ne povas ekzisti vera spirita kulturo kune kun idol-adoro al sporto.

Eĉ la plej terura kaj hontinda por kristana lando, kiu posedas milojn da preĝejoj, milojn da pastroj de la plej diversaj sektoj:— en la granda antaŭpaska vendredo, en la tago de kruc-suferoj kaj pro-nia morto de nia Savinto Jesuo Kristo, anstataŭ preĝadi kaj fastadi, la tuta popolo de Aŭstralio, kiel idolanoj, antikvaj grekoj kaj romanoj, partoprenas ĉevalvetkurojn....Ho, kiel Sankta Johano Krizostomo en la kvara jarcento vipumis en siaj elokventaj predikoj la popolojn pro tia sama sportamo. Kaj kiel ĝustaj estus liaj vipantaj vortoj nun, sed lokaj pastroj forgesis la esencon de religio, cedas al la spirito de la tempo moderna; iliaj buŝoj silentas.

(Finota)

FROM OUR SUPPORTERS

We thankfully acknowledge the following. The smallness of the sum, however, speaks eloquently of the indifference, not to say discourtesy, of many lapsed subscribers to whom intimation after intimation have been forwarded without eliciting any reply. These, it seems, are content to allow the generosity of a fervent few to meet what appears to be a regular yearly deficit. We trust that an awakened conscience may lengthen next months' subscription list.

Mr. C. Ballard, 1/-; sales in Perth, 2/-; Mr. J. Nishimura, 6/-, Jan., '32; per Mrs. Mumford, 2/6; Mr. Farquharson, 5/-, Jan., '32; Mr. C. Adcock, 5/-, March, '32. Total, £1/1/6.

WESTRALIAN ESPERANTO SOCIETY kunvenas ĉiun jaŭdon, je 7-30a horo vespere, ĉe 197 Murray St., Perth, kontraŭ Boans Ltd, Prezidanto, S-ro H. Byatt, D.B.E.A. Sekretariino, F-ino E. Griffin, 135 Central-av., Maylands, W.A.

Masterton (N.Z.) Esperanto-Grupo. Prezidanto, S-ro Johns; Sekretariino, s-ro H. Franks, 38 Worksoy-rd. Kunvenas en ĉiu mardo je la oka horo vespere en la kunveno ĉe la Y.M.C.A.

Auckland (N.Z.) Esperanto Societo kunvenas la duan lundon de ĉiu monato je 7.45a horo vespere ĉe Nov-Preĝejo Halo (New Church Hall) Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell. Sekretariino: S-ino E. M. Watkin. Komunikadojn al la prezidanto ĉe Kent's Buildings, Newmarket, Auckland.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro P. Hudson; sekretariino f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunveno: Scots Church Hall, 97 Russell St. Marde vespere, je la oka horo. R. Banham, "Age" Reading Room, Collins-st., post la 6.30a vespere.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun jaŭdon de 8-10 pt. ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; s-ro E. A. Pryke, D.B.E.A.; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 64 Brighton-st., Croydon.

Brisbano Esperanto-Societo kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str., proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: Maŭrico Hyde, FBEA. Vicprezidantoj: fraŭlino Rose Macpherson, Klement Kidd. Bibliotekisto: Oskar Behncken (Def: UEA). Sekretario: fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, GPO, Brisbane, Kvinslando (Queensland)

Wellington Esperanto Club.—Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. E. C. Jack; Vice-President, Miss Coralie Smythson; Secretary, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A. 34, Argentine Avenue, Miramar. Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A. Write for book list.